

Jacques Cartier, franca navigisto (1491-1557)

Aŭtoro: Christian Bertin

Dato: 22-an de Junio 2007.

1 Resumo

Jacques Cartier (Saint-Malo, 1491 - Saint-Malo, 1557), franca navigisto.

Por la franca reĝo Francisko la Unua, Jacques Cartier faris tri ekspediciojn por serĉi pasejon al Ĉinio kaj Japanio tra la nordo de la Nova Mondo kaj trovi riĉaĵojn. La unua vojaĝo okazis en 1534, li alboridiĝis en Kanado (vorto, kiu originas de la irokeza vorto "Kanata", kiu signifas vilaĝon) kaj esploris la golfon de Sankta-Laŭrenco sen malkovri la riveregon. Okaze de la dua ekspedicio en 1535-1536, li malkovris kaj supreniris la riveregon Sankta-Laŭrenco ĝis Hochelaga sur insulo, al la monteto sur la insulo, li donis la nomon Mont Royal (Montréal). Tie li trapasis sian unuan vintron. Li estas konsiderata kiel la malkovrinto de Kanado. Okaze de la tria ekspedicio en 1541-1542, li instalas kolonion en Charlesbourg-Roy (apud Kebeko) sed pro la severaj vintroj, la skorbuto kaj la problemoj kun la indianoj, la franca reĝo reheimigis la postvivintojn de la kolonio en 1543.

2 Enkonduko

En 1453, la turkoj kaptis Konstantinoplon (nun nomatan Istanbul) kaj iom post iom pli kaj pli pagigis la okcidentanojn, kiuj deziris iri al Azio por la komerco de la spicoj. Tial la okcidentanoj provis trovi alian vojon por iri al Azio.

Tiel, en 1492, la hispano Kristoforo Kolumbo malkovris Amerikon, serĉante vojon al Azio irante okcidenten.

La portugalo Vasco de Gama ĉirkaŭiris Afrikon en 1498 kaj tiel atingis Azion.

3 La vivo de Jacques Cartier

Jacques Cartier (p.: ĵak Kartje) naskiĝis inter la 7-a de Junio kaj la 23-a de Decembro 1491 en la haveno Saint-Malo (p. san malo) en Bretonio, nun en Francio.

Li estis la filo de Jamet Cartier kaj de Josseline Jansart. Li havis unu fraton kaj unu fratinon.

Post la malvenko de la bretonoj en 1488 kontraŭ la francoj, la duklando Bretonio ligiĝis al Francio per la edziĝo de Anna de Bretonio al la franca reĝo en 1491. La definitiva kuniĝo de Bretonio al Francio okazos nur en 1532.

En 1506, Jean Denys estis la unua, kiu skribis raportis pri la franca fiŝado ĉe Novtero.

Malmulton ni scias pri la vivo de Jacques Cartier antaŭ 1532.

Kiam li estis 13-jara (1504), li fariĝis ŝipknabo kaj partoprenis al la fiŝado ĉe Novtero kaj ĉe la okcidentaj marbordoj de Afriko.

En Aprilo aŭ Majo 1520, li estis velŝipa mastro, kiam li edziĝis al Catherine Des Granches el familio pli grava ol la lia, filino de Jacques Des Granches, kavaliro de la reĝo kaj konestablo de Saint-Malo.

Ili ne havos infanojn.


Jacques Cartier proponis sian servon al Philippe de Chabot, Senjoro de Brion kaj Admiralo de Francio en tempo, kiam la franca reĝo Francisko la Unua deziris etendi la francan koloniadon.

En 1532, la franca reĝo Francisko la Unua pilgrimis al la monteto Sankta-Mikaelo. Okaze de tiu vizito, Jacques Cartier fariĝis ŝipkapitano. La episkopo de Saint-Malo kaj abato de la monteto Sankta-Mikaelo, Jean le Veneur, proponis al la franca reĝo, Francisko la Unua, ekspedicion al la Nova Mondo. Li argumentis, ke Jacques Cartier jam iris al Brazilo kaj al Novtero.

Oni neniam retrovis la komisileteron, kiun li ricevis de la franca reĝo en la 19-a de Marto 1534 sed ordono de la reĝo en la sama jaro klarigis la celon: **serĉi nordokcidentan pasejon al la "lando de cathay" (Ĉinio) kaj de "Cipango" (Japanio) kaj malkovri insulojn kaj landojn, kie oni diris, estas grandaj kvantoj da oro kaj riĉaĵoj** (en malnova franca: « découvrir certaines ysles et pays où l'on dit qu'il se doit trouver grant quantité d'or et autres riches choses »).

3.1 La unua vojaĝo (20-a Aprilo – 5-a Septembro 1534)

Jacques Cartier deiris de Saint-Malo en la 20-a de Aprilo 1534. Estis du ŝipoj: "Petite Hermine" (60 toneloj) kaj "l'Emerillon" (40 toneloj) kun 61 ŝipanoj. "Hermine" en la franca lingvo estas "ermeno". Tiu besto estas simbolo de Bretonio, kaj precipe de la dukino Anna de Bretonio.



Ŝipo "Grande Hermine", galiontipa, kun la kameoj de Jacques Cartier kaj de la franca reĝo Francisko la Unua

Fonto: "Grande Hermine, the most celebrated of French ships of the Galleon type, with cameos of Jacques Cartier & Francis I, King of France in margins." c1923. Prints and Photographs Division, Library of Congress.


Facile, Jacques Cartier trairis Atlantikon en 20 tagoj. Li atingis lokojn jam konatajn de bretonaj fiŝistoj: la kabo de Bonne Viste (angle: Cape Bonavista) kaj la golfeto de Châteaux (la markolo de Belle Isle).



Ŝipoj de la unua vojaĝo

La 9-an de Junio, Cartier eniris la golfeton kaj trovis, je dek leŭgoj, la havenon Brest (Blanc Sablon), kie la morufiŝistoj sin proviantis per akvo kaj ligno. Poste, pli ol cent mejlojn de Belle-Isle, Cartier renkontis ŝipon de La Rochelle, kiu montris al li la vojon. Tiu regiono estis jam konata.

Li donis nomojn al geografiaj apartaĵoj: la insulo Sainte-Catherine, Toute-îles, haveno Saint-Antoine, haveno Saint-Servan (kie li starigis la unuan krucon), rivero Saint-Jacques, haveno Jacques-Cartier.



Mapo de la unua ekspedicio de Jacques Cartier (1534)

© National Library of Canada

Fonto: National Library of Canada

Cartier havis nur malestimon por tiu nefekunda kaj seka tero, kiu meritis la nomon "tero de Caïn".

La 12-an aŭ la 13-an de Junio, Cartier renkontis indianojn (verŝajne Béothuks), kiuj estis venintaj por ĉasi lupfiŝojn.

Nur la 15-an de Junio, komenciĝis la vojaĝo en nekonata mondo. Li laŭiris la okcidentan marbordon de Novtero ĝis kabo St John kaj atingis la markolon de Cabot, sed ne rimarkis, ke estis pasejo kaj do pluiris okcidenten.

Li malkovris la insulon Brion kaj atingis la insulojn de la Madeleine en la 26-a de Junio sed kredis, ke estis la komenco de kontinento. La 29-an de Junio, li malkovris la insulon Prince-Édouard, sed ne rimarkis, ke ĝi estis insulo. Ankaŭ tie li ekvidis indianojn.

Poste, li vizitis diversajn golfetojn, esperante trovi pasejon al Azio, sed ĉiam sensukcese.

Al la suda pinto de la golfeto de Chaleurs, li donis la nomon de kabo Espérance pro la espero, kiun ili havis.

De la 4-a ĝis la 9-a de Julio, li metode esploris por fine konkludi al la neesto de pasejo, kio senkuraĝigis ilin. En la 7-a de Julio, li komercis kun la indianoj Micmacs.



Unua renkontiĝo inter Cartier kaj amerindianoj

La 14-an de Julio, li eniris la golfeton de Gaspé, kie li restadis ĝis la 25-a de Julio. Tiel li tre utile ekrlatis kun la irokezoj, kiuj estis pli ol 200 venintaj de Stadacona, por la ĉiujara kaptado de fokoj. Ili alianciĝis okaze de ĝoja festo kun dancoj.

La 24-an de Julio, sur la pinto Penouille, Cartier starigis 30-futan krucon kun la blazono de Francio kun la gravurita frazo: Franciscus PRIMUS, DEI GRATIA FRANCORUM REX, REGNAT"



Jacques Cartier starigis la krucon kun blazono en Gaspé

Tio signalis la akaparon de la lando nome de la franca reĝo, Francisko la Unua. La indiana ĉefo Donnacona protestis kaj fine konsentis al tio: du filoj de Donnacona, Domagaya kaj Taïnoagny veturos kun Jacques Cartier sed li promesis reveni kun ili. Post lasta festado, Jacques Cartier eliris el la golfo de Gaspé, la 25-an de Julio, kun la du irokezoj, kiuj povus utili kiel interpretistoj.

Li ĝiris orienten anstataŭ okcidenten, opiniante ke la markolo larĝa je 40 mejloj inter Gaspezio kaj Anticosti estis nur enirejo de golfeto. Tiel li maltrafis la malkovron de la riverego Sankta-Laŭrenco. Li, ĝis la 29-a de Julio, ĉirkaŭiris la insulon Anticosti, opiniante ke ĝis estis duoninsulo.

De la 1-a ĝis la 5-a de Aŭgusto, li esploris la golfon norde de la insulo Anticosti sed pro la malbona vetero, li preferis ne esplori plu kaj decidis reveni al Francio. Li rekte iris al Novtero kaj, la 15-an de Aŭgusto, komencis la revenan vojaĝon.

Jacques Cartier, eble ne estis la unua, kiu esploris la golfon, sed estis la unua, kiu desegnis ĝian mapon. Li estis maltrafinta la pasejon inter Novtero kaj kabo Cap-Breton kaj la enirejon de la riverego. Cartier estis konvinkita, ke estis nur unu certa enirejo, la markolo de Belle-Isle, kaj unu ebla, norde de insulo Anticosti.

Li revenis en Saint-Malo en la 5-a de Septembro 1534, sen oro kaj aliaj riĉaĵoj, sed kun informoj pri nova lando, malkovro de interna maro, alianco kun indianoj kaj du indianoj, kiuj lernas la francan lingvon.

La unua vojaĝo estis daŭrinta 137 tagojn.

Ekde la 30-a de Oktobro, li ricevis novan komision kaj monon (3000 pundoj) de la franca reĝo, Francisko la Unua por pluesplori.

3.2 La dua vojaĝo (19-a Majo 1535 – Julio 1536)

Por la dua vojaĝo, Jacques Cartier deiris de Saint-Malo la 19-an de Majo 1535.


Estis 3 ŝipoj: "Petite Hermine" (60 toneloj), "Grande Hermine" (120 toneloj) kaj "l'Émerillon" (40 toneloj) kaj 110 ŝipanoj.

Sur la ŝipo "Grande Hermine", la ŝipmastro Thomas Fromont asistis Jacques Cartier. Kun li estis Claude de Pontbriand, Charles de La Pommeraye, Jehan Poulllet, supozata aŭtoro de la priskribo de la dua vojaĝo. Sur la ŝipo "Petite Hermine" Guillaume Le Marié stiris sub la regado de Macé Jalobert. Sur la ŝipo "l'Émerillon" regis Guillaume Le Breton Bastille kun la stiristo Jacques Maingart. Multaj parencoj de Jacques Cartier kaj de ties edzino estis sur la ŝipoj: Étienne Noël, Macé Jalobert, Antoine Des Granches, kaj aliaj. Oni ne scias, ĉu estis pastroj, sed kutime kun tiom da homoj, estis pastroj.

Vojaĝis ankaŭ Domagaya kaj Taïnoagny, la filoj de la estro Donnacona.

Tiu malfrua deiro kun tri ŝipoj pruvas, ke li ne intencis reveni en la sama jaro.

La traŭro daŭris dum 50 tagoj por la unua ŝipo, tio estis multe pli ol la 20 tagoj de la unua vojaĝo.



Mapo de la dua ekspedicio de Jacques Cartier (1535-1536)

© National Library of Canada

Fonto: National Library of Canada

En la 26-a de Julio, la tuta ŝiparo reunuiĝis. Li pluesploris la nordan marbordon. Por signali la vojon, li starigis krucon en haveno, okcidente de Natashquan.

En la 10-a de Aŭgusto, li haltis en golfeto, kiun li nomis Sankta-Laŭrenco pro la nomo de la tiutaga sanktulo (nun Sainte-Geneviève), kies nomo baldaŭ iros al la golfo kaj poste al la rivero.



Fine, dank'al la gvido de du indiĝenaj gvidistoj, la 13-an de Aŭgusto, li eniris la riveron de Kanado, renomitan Sankta-Laŭrenco komence de la 1600 jaroj. Tio estis la komenco de la granda rivero de Hochelaga kaj de Kanado. La rivero, kiu mallarĝigas laŭ la iro, komence salita kaj poste dolĉa, venas de tiel malproksime, ke neniuj memoras pri homo, kiu vidis ĝian fonton. Por Jacques Cartier, tio fine estis la pasejo, kiun li serĉis.

Fonto: : <http://www.republiquelibre.org/cousture/CARTIER.HTM>

Ekzamenante la du bordojn, Cartier supreniris la riveregon. Dekstre, li ekvidis profundan kaj rapidan riveron, kiu kondukas al Saguenay, reĝlando kun mirindaj rakontaĵoj.

La 7-an de Septembro, Jacques Cartier atingis la insulon de Orléans, kiu estas la komenco de la provinco Kanado. Tiam la vorto Kanado respondis al la nuna regiono de Kebekio. Post festado kun Donnacona, Cartier decidis setli sur la rivero Sainte-Croix (Saint-Charles), je la enfluejo de la rivereto Laitet. Vid-al-vide staras la kabo de Stadacona (nun Kebeko), kie loĝis la irokezoj.


Jacques Cartier senpacience deziris iri al Hochelaga (sur la insulo de Montrealo), sed la indiĝenaj interpretistoj komencis intrigi kontraŭ la francoj.

Donnacona deziris la monopolon de la estonta komerco, esperante eskapi al la regado de la irokezoj fare de Hochelaga. Pro tio li provis deteni lin.

Neniu el la indianoj akceptis akompani lin. Tamen la 19-an de Septembro, Jacques Cartier deiris sur la ŝipo "l'Émérillon", sed sen interpretistoj. Haltinte en Achelacy (regiono de Portneuf), li alianciĝis kun la loka registro. Tie li trovis aliajn gvidantojn por konduki lin al Hochelaga.

Atinginta la lagon, kiun li nomis Angoulême (lago Saint-Pierre), li postlasis sian ŝipon kaj pluiris sur boato kun trideko da homoj. La 2-an de Oktobro, li atingis Hochelaga, urbo ĉirkaŭbarita laŭ irokeza maniero, apud monto, kiun li nomis "mont Royal".

Tie vivis 2000 irokezoj.




La insulo de Montrealo

Fonto: <http://jacquescartier.org/compagnons/index-occidentales.html>

La navigebla akvovojo uzata de la indiĝenoj kaj verŝajne de Jacques Cartier por atingi Hochelaga estis la rivero "des prairies" kaj ne la rivero Sankta-Laŭrenco. Multaj dokumentoj atestas pri tio (Relations des Jésuites, la priskribo de Samuel de Champlain aŭ de Gabriel Sagard Théogat). La rapidejoj de tiu rivero estis malpli danĝeraj ol tiuj de Lachine sur la rivero.

Cartier volis impresi la loĝantojn de Hochelaga, pro tio li surmetis sian uniformon, li ordonis al la ŝipanoj ordiĝi en paradvicoj kaj eniris la irokezan vilaĝon sone de trumpetoj kaj aliaj muzikiloj. La akceptado estis ĝoja. La irokezoj eĉ prezentis siajn malsanulojn por kuracado.



Irokeza vilaĝo Hochelaga, 1556

Jacques Cartier (en la maldekstra-malsupra parto) estis akceptata kun siaj ŝipanoj ĉe la enirejo de la vilaĝo.

© Publika

Primo -terzo volume, & terza edizione delle navigationi et viaggi raccolto gia da M. Gio Battista Ramvsio...; Giovanni Battista Ramusio. Venetia: Nella stamperia de Givnti, 1563-83

Fonto: National Library of Canada

Kun la permeso de Bibliothèque et Archives Canada/NMC-1908)



Cartier en Hochelaga (nun Montrealo)

Laŭ L. R. Batchelor

© National Archives of Canada/C-010522

Fonto: National Archives of Canada

Post la festado, la gastigantoj kondukis Cartier al la supro de monto Royal, de kie ili klarigis pri la ĉefaj akvovoj, montrante la riverojn ĉe la horizonto venantaj de vastaj sensalaj maroj de la okcidento. Ili diris ankaŭ al li, ke la oraj, la arĝentaj kaj la kupraj objektoj, kiuj ili posedis, venis de la nordokcidento. La konkludo de Cartier estis, ke la vojo al Azio povus esti ne malproksima.



Jacques Cartier sur la monteto Mont Royal.

Pentristo: Alfred Faniel

Fonto: <http://jacquescartier.org/compagnons/indes-occidentales.html>

Cartier navigis ĝis la rapidejoj Lachine, kiuj okcidente baras la navigadon sed ne sukcesis transpasi ilin. La indianoj klarigis al li ke, malantaŭe estas pliaj rapidejoj, kiuj baras la riveron. Sen plu enketi, pro timo al la venanta vintro kaj baldaŭa elĉerpiĝo de proviantoj, Cartier forlasis Hochelaga, la 3-an de Oktobro. La 7-an de Oktobro, li haltis ĉe la enfluejo de la rivero de Fouez (Saint-Maurice) kaj tie starigis krucon.

Kiam Cartier revenis je Stadacona, liaj viroj estis fortikigintaj la bivakon, ĉar intrigoj estis rompintaj la reciprokan amikecon.

Thévet, en posta libro, atestis kun konfirmo de vaskaj fiŝistoj, ke stulta franca ŝipano, kiu volis montri la efikecon de sia spado, severe vundis indiĝenon. Posta reprezalio mortigis 35 ŝipanojn de la ekspedicio.



Titola paĝo kaj internaj paĝoj de la libro de André Thévet

© Publika

Thévet, André. *Les Singularitez de la France antarctique, autrement nommée Amerique, & de plusieurs terres & isles decouvertes de nostre temps*. Paris: Héritiers de Maurice de la Porte, 1558.

Fonto: National Library of Canada

"Ainsi se voulurent ils defendre contre les premiers, qui allerent decouvrir leur païs, faisans effort, avec quelques gresses & huiles, de mettre le feu la nuict es navires des autres abordées au rivage de la mer. Dont les nostres informez de ceste entreprise, y donnerent tel ordre, qu'ils ne furent aucunement incommodez. Toutefois j'ay entendu que ces pauvres Sauvages n'avoient machiné ceste entreprise, que justement & à bonne raison, considéré le tort qu'ils avoient receu des autres. C'est qu'estās les nostres descenduz en terre, aucuns jeunes folastres par pasetemps, vicieux toutefois & irraisonnables, comme par une maniere de tyrannie couppoient bras & jambes à quelques uns de ces pauvres gens, seulement disoient ils pour essayer, si leurs espées trenchoient bien, nonobstant que ces pauvres Barbares les eussent receu humainem^t avecques toute douceur & amytié. Et par ainsi depuis n'ont permis aucuns Chrestiens aborder & mettre pié à terre en leurs rivages & limites, [...]"
(Thévet 1558, 157)

Poste, la francoj devis travivi la laŭrencan vintron por la unua fojo, kaj ĝi estis rigora. De la mezo de Novembro ĝis la mezo de Aprilo, la ŝipoj estis kaptitaj de la glacioj. La neĝo estis pli ol 4-fute alta. La riverego frostis ĝis Hochelaga. La vino kaj la cidro estis frostintaj en la bareloj.

Aldone al tio, pro manko de freŝaj nutraĵoj, la skorbuto ekfrapis la indiĝenojn de Stadacona en Decembro. Malgraŭ la sanitara ĉirkaŭbaraĵo, ĝi atakis ankaŭ la francojn. Meze de Februaro, el la 110 viroj de Cartier, nur 10 bone fartis. 8 estis mortintaj. Cartier kaj ties viroj procesiis al bildo de la Virgulino kaj li promesis pilgrimi al Roc-Amadour. Fine, Cartier eksciis de Domagaya, kiu estis estinta malsana pro skorbuto, la sekreton de la tisano de la okcidenta tujo (scienca nomo: *Thuya occidentalis*). Rapide la ŝipanaro resaniĝis, sed entute 25 mortis.

Cartier multe lernis de la indiĝenoj pri la kanada geografio: la riveroj Richelieu kaj Saguenay, la grandaj lagoj.

Printempe, Cartier preparis la reiron al Francio, sed manke de sufiĉa ŝipanaro, li devis lasi la ŝipon "Petite Hermine" (aliaj skribis, ke li detruis ĝin). En 1842, oni malkovris restaĵojn de ŝipo sed ĉu vere ili estis tiuj de la ŝipo "Petite Hermine", nenio certas.

Antaŭ ol foriri, Cartier volis firmigi la francajn poziciojn endanĝerigitajn de Donnacona kaj de ties filoj. Cartier eksciis pri rivalo Agona, kiu deziris la regadon.

Li profitis pri religia ceremonio – la starigo de kruco en la festo de la 3-a de Majo por kapti dek irokezojn, inter ili estis Donnacona, la interpretistoj kaj aliaj indiĝenoj.

Li kvietigis la popolamason promesante reveni kun Donnacona post 10 aŭ 12 lunoj, kun gravaj donacoj de la reĝo. Por Cartier, grave estis reveni kun la ĉefo por priksribi antaŭ la reĝo la mirindaĵojn de la nove trovitaj okcidentaj landoj.

La 6-an de Majo, Cartier forlasis Sainte-Croix sur la du ŝipoj kun deko da irokezoj, el kiuj kvar infanoj donitaj al li en la antaŭa aŭtuno. En sia kargo, li havis dekduon da orpecoj kaj peltojn. Irante inter la insulo Anticosti kaj Gaspesio, li konstatis la insulecon de la insuloj de la Madeleine, tiam nomitaj les Araines, kaj malkovris inter Novtero kaj la kabo Cap-Breton la pasejon, kiun li ne vidis en 1534.

Oni povas legi sur la ŝipĵurnalo de Cartier, ke li haltis en Saint-Pierre de la 11-a ĝis la 16-a de Junio kaj tie vidis plurajn ŝipojn el Bretonio kaj el Francio (malnovfrance: "Nous fûmes aux dictes yles Saint-Pierre où trouvasmes plusieurs navires tant de France que de Bretagne, depuis le jour Saint Barnabé, onzième de Juing, jusques au seizième jour dudict moys que appareillasmes des dictes yles Saint-Pierre.").

Poste li haltis ankoraŭ unufoje en Novtero kaj revenis en Saint-Malo la 16-an de Julio 1536, post 14-monata foresto.

Post sia reveno, Jacques Cartier raportis al la franca reĝo Francisko la Unua. Li parolis pri 800-leŭga rivero, kiu eble kondukas al Azio. Li atestigis Donnacona, kiu parolis pri la ege riĉa lando de Saguenay. Li revenis kun oro. La reĝo, tre entuziasma, donacis al li la ŝipon "Grande Hermine".

Bedaŭrinde milito okazis inter la franca reĝo, Francisko la Unua kaj la germana imperiestro, Karolo la Kvina.

La 17-an de Oktobro 1538, la franca reĝo, Francisko la Unua, nomis Jacques Cartier ĝenerala kapitano kaj mastro-stiristo de ĉiuj marŝipoj (malnovfrance: "capitaine général et maistre pillotte de tous les navires et autres vaisseaux de mer.").

En 1539, okazis la baptado de 3 amerindianoj en Saint-Malo.

Nur en la 17-a de Oktobro 1540, la franca reĝo komisiis Cartier por tria vojaĝo.

3.3 La tria vojaĝo (23-a Majo 1541 – Septembro 1542).

Jam en 1540 okazis 8 fiŝadekspedicioj al Novtero de la haveno Bordoza. Fiŝadekspedicioj okazis en similaj nombroj de la havenoj La Rochelle kaj Rouen. La nombro de tiuj fiŝadekspedicioj rapide kreskis, kaj de Bordoza estis pli ol 50 fiŝadekspedicioj al Novtero en 1560.

Cartier estis nomita ĝenerala kapitano de la nova ekspedicio, por iri al Kanado, Hochelaga kaj Saguenay, kun homoj plej kvalifikaj, artaj kaj industriaj, el kiuj kvindek da viroj el karceroj. Cartier sin preparis sed la 15-an de Januaro 1541, reĝa decido alvenis: la protestanto Jean-François de La Rocque de Roberval ricevis komisileteron, kiu postenigis lin kiel estron de la granda kolonionta ekspedicio (inter 400 kaj 700 homoj) anstataŭ Cartier. Per la sama komisiletero, la franca reĝo nuligis la oktobran komision al Cartier. Cartier fariĝis la subulo de Roberval.

La patro de Roberval estis altnivela langvedoka nobelo, guberniestro de Carcassonne. Li vivis ĉe la Kortego de la reĝo. Partopreninta en la militoj de Italio, konata pro la valorigo kaj fortikigo de sia bieno, li estis ankaŭ parenco de Diana de Poitiers, la amorantino de la reĝo. Lia aliĝo al la protestantismo gajnis al li la favorojn de Margerita de Navarre, la fratino de la reĝo.

Por tiu koloniada ekspedicio, la religio certe rolis. Necesis ankaŭ evangelizi tiujn novajn landojn kaj loĝantojn.

En Majo 1541, Cartier estis preta, sed Roberval atendis ankoraŭ sian artilerion. Ĉar la reĝo forte deziris la rapidan deiron de Cartier, Roberval donis al Cartier « plenan aŭtoritatecon por deiri » kaj la taskon reprezenti lin. Cartier skribis sian testamenton la 19-an de Majo kaj alnavigis la 23-an de Majo sur kvin ŝipoj: "Grande Hermine", "l'Émérillon", "Georges", "Saint-Brieux" (aŭ "Saint-Briac") kaj plia ŝipo kun proviantoj por du jaroj. Estis ĉirkaŭ 1500 homoj sur la ŝipoj kaj eĉ 50 krimuloj.



Ŝipo « La Grande Hermine »
Kopio en Kebeko (foto de Kim Patrick O'Leary).

Surŝipe estis ankaŭ bofratoj de Jacques Cartier (Guyon Des Granches, vicgrafo de Beaupré kaj Macé Jalobert, la stiristo), lia nevo (Jacques Noël) kaj la ŝipmastro (Tomas Fromont, alinomita La Bouille), kiu mortis en tiu vojaĝo.

La irokezoj, kiujn li kaptis kaj kunvenigis en 1536 (inter ili la ĉefo Donnacona), estis escepte de knabineto mortintaj.

Post pli ol 3-monata malfacila vojaĝo, la 23-an de Aŭgusto 1541, Cartier reaperis antaŭ Stadacona kun brutaro, kaprinoj, porkoj por multigi ilin en la lando (malnovfrance: "bétail, aussi bien chèvres, porcs qu'autres animaux que nous avons apportés pour les multiplier dans le pays"). Ĝoje akceptita, Jacques Cartier anoncis la morton de Donnacona, sed li asertis, ke la aliaj irokezoj lukse vivis en Francio kiel senjoroj kaj ne volis reveni.

La denove amikaj rilatoj ne daŭris. Verŝajne pro la reciproka malfido, Jacques Cartier forlasis Sainte-Croix por supreniri la riveregon kaj setlis ĉe la okcidenta pinto de la kabo, ĉe la enfluejo de la rivero Cap-Rouge (Kabo diamant). Tie oni trovis okcidentajn tujojn, orfoliojn kaj ŝtonojn, kiuj ne estis diamantoj, kvankam ili kredis tion. Pro tio la kabo nomiĝas nun la kabo de la diamantoj.

Tie Cartier adoptis defendan kaj okupan strategion. De la 26-a de Aŭgusto ĝis la 2-a de Septembro, li malŝarĝigis la ŝipojn. Li plugigis la grundon kaj semigis grajnojn.

La kolonio, unue estis nomita Charlesbourg-Royal, honore al Karolo, filo de Francisko la Unua.

La 2-an de Septembro, Jacques Cartier komisiis sian bofraton Marc Jalobert kaj sian nevon Etienne (?) Noël reiri al Francio sur du ŝipoj por raporti al la reĝo. Marc Jalobert revenos kun Roberval, la sekvantan jaron.

Tiam li komencis la konstruon de du fuortoj: unu piede de la kabo, la alia sur la supro.

La 7-an de Septembro, lasante la kolonion sub la ordonoj de la vicgrafo de Beaupré, li eknavigis al Hochelaga kaj survoje salutis sian amikon la ĉefo de Achelacy, al kiu li konfidis du knabojn por instrui al ili la lingvon.

Cartier deziris esplori la rapidejojn de Hochelaga por transpasi ilin en la sekvanta printempo. La indianoj amike akceptis lin sed pro manko de interpretistoj li ne progresis en la kono de la transa lando.

Revene li konstatis ke la reciproka malfido estis kreskinta, eĉ la ĉefo de Achelacy forlasis lin. La francoj sin preparis por defendo. La priskribo de la sekvo de tiu 3-a vojaĝo estas perdita aŭ ne ekzistas.

La francoj travivis la vintron tie, ĉe la enfluejo de la rivero Cap-Rouge. Verŝajne la skorbuto frapis denove sed la tizano de okcidenta tujo efike kuracis ĝin.

Dum tiu tempo, per komisiono de la 15-a de Januaro 1542, la reĝo Francisko la Unua decidis pri nova ekspedicio kun militistoj kaj metiistoj inaj kaj viraj por konstrui urbojn, fuortojn, templojn kaj preĝejojn (malnovfrance: "bon nombre de gentishommes et autres tant gens de guerre que popullaire de chacun sexe et arts liberaulx et mecaniques" por "construire et edifier villes et fortz, temples et églises... établir des lois et des officiers de police...").

Roberval, kiu ne sukcesis deiri kun Jacques Cartier, la antaŭan jaron, pretigis tri velŝipojn. La 16-an de Aprilo 1542, la tri ŝipoj deiris de La Rochelle kun pli ol 200 homoj. La 8-an Junio ili haltis en la haveno de Saint-Jean de Novtero (St John's sur anglalingvaj mapoj), kie estis jam dek-sep fiŝistaj ŝipoj.

En Junio 1542, Cartier ne plu volis atendi Roberval kaj decidis reiri al Francio. Li haltis en la haveno de Saint-Jean sur Novtero, tie li renkontis Roberval. Roberval, kiu havis gravajn trupojn, ordonis al Cartier retroiri kun li sed estis tro malfrue por Cartier.

Ĉar li kredis transporti oron kaj diamantojn aŭ pro timo alfronti denove la indiĝenojn, Cartier fuĝis en la nokto al Francio, senigante Roberval je gravaj homaj rimedoj kaj spertoj.

Roberval plenigis per akvo kaj ligno kaj foriris de Saint-Jean la 30-an de Junio, supreniris la riveregon Sankta-Laŭrenco kaj post unu monato atingis Cap Rouge. La aliaj ŝipoj kun Marc Jalobert kaj eble Etienne Noël, atingis Charlesbourg-Royal post plia monato.

Du fuortoj estis konstruitaj, unu supre kaj la alia malsupre.



La regiono de Charlesbourg-Royal kaj la fuortoj de Kabo Diamanto (Cap Rouge)

Fonto: <http://jacquescartier.org/compagnons/index-occidentales.html>

Li renomis la lokon "France-Roy" kaj la riveregon Sankta-Laŭrenco "France-Prime".

En Aŭgusto, ĉiu laboris laŭ sia metio.

La 14-an de Septembro 1542, du ŝipoj velis al Francio por reveni la sekvantan jaron kun proviantoj.

Siaflanke Cartier revenis en Saint-Malo en Septembro 1542. Tio estis la lasta fora misio komisiita al Cartier.

Sed la orminaĵo estis nur ferpirito kaj la diamantoj nur kvarco-pecoj, de tio originas la proverbo "falsa kiel diamantoj de Kanado".

Dum tiu tempo, dum la vintro en Kanado, pli ol kvindek personoj mortis pro la skorbuto, verŝajne nesciante pri la indiana rimedo. La glacioj ekdegelis en Aprilo. Tamen, Roberval volis revidi la tri rapidejojn. La 5-an de Junio 1543, Roberval, kun 70 ŝipanoj navigis al Hochelaga por esplori la regionon de Saguenay trans la rapidejoj. Unu el la boatoj renversiĝis kaj ok homoj mortis pro drono. Tridek personoj estis restintaj ĉe Cap-Rouge.

Informita pri la problemoj de la kolonio, Francisko la Unua ordonis al Paul d'Aussillon reiri al kanado kun du ŝipoj ŝargitaj per proviantoj por France-Roy. D'Aussillon alvenis meze de Junio sed la komisiletero postulis, ke ili restu ĝis la tago de sankta Magdalena, tio estis la 22-a de Julio.

Postvivinta vintron, skorbuton, kverelojn kaj batalojn, la kolonio malaperis kun la rehejmigo de la postvivintoj en Septembro 1543. Cartier ne estis tiu, kiun la reĝo komisiis por rehejmigi Roberval.

Printempe de 1544, Cartier aperis antaŭ speciala tribunalo. Li devis pruvi sian fidelecon kiel deonprenanto de la mono de la reĝo kaj de Roberval.

En 1545 aperis la "Brief Récit", priskribo de la dua vojaĝo sen nomo de aŭtoro, en kiu la nomo de Cartier aperis nur unufoje.

Ekde tiam Cartier sin dediĉis al sia komerco kaj al la plivalorigo de sia bieno Limoilou en Rothéneuf apud Saint-Malo.



La bieno de Jacques Cartier (nun muzeo pri li) kaj lia busto en la muzeo

Tie, li akceptis gravajn vizitantojn, kiuj estis Rabelais. Li plurfoje fariĝis baptopatro kaj atestis ĉe la Kortego.

Li mortis la 1-an de Septembre 1557, kiam li estis 66-jara, pro la pesto, kiu frapis la regionon de saint-Malo.

Ŝia edzino, Catherine Des Granches, mortis en Aprilo 1575.

Lia nevo Jacques Noël, provis daŭrigi lian verkon.

Ne ekzistas aŭtenta portreto de Jacques Cartier, nur ok supozataj portretoj ekzistas:

- Ducola krokizo (post 1542) sur mapo nomata Harléienne, atribuita al Pierre Desceliers;
- Desegnaĵo sur la mapo de Vallard en 1547;
- Unucola krokizo en eldonaĵo de Ramusio en 1556;
- Portreto farita de Léopold Massard laŭ la krokizo de Desceliers, eldonita en 1836;
- Portreto farita de François Riss en 1839, republikigita de Théophile Hamel;
- Portreto eldonita de Michelant, laŭ desegnaĵo, aparteninta al la nacia Biblioteko;
- Ligna medaliono 20-cola laŭ diametro, datita de 1704 kaj trovita en 1908 fare de Clarke en malnova domo de Gaspesio;
- Kopio de portreto apartenanta al la markizo de Villefranche.

Lancot opiniis, ke nur la krokizo sur la mapo de Desceliers estis aŭtenta. La aliaj portretoj estus nur kopioj de la unua aŭ imagaj.

La priskribo de la unua vojaĝo estis unue eldonita en la itala lingvo fare de Ramusio en 1556, poste en la angla fare de Florio en 1580, kaj fine en la franca de Raphaël du

Petit-Val en 1598. Manuskripto troviĝas en la nacia Biblioteko (no 841 de la donaco Moreau), sed ĝi estas nur kopio de malaperinta originalo.

La tria volumo de "Delle Navigazioni et Viaggi" estis eldonita en Venecio (Italio) en 1556 de Giovanni Battista Ramusio. Li entenas la priskribon de la du unuaj vojaĝoj de Jacques Cartier trans la Novaj Teroj: la unua ekspedicio de Cartier en Novfrancio, al Gaspé en 1534 kaj la dua ekspedicio de Cartier al Hochelaga en 1535. Tiu volumo entenas ankaŭ aliajn priskribojn de aliaj esploristoj, kiuj estas Cortez kaj Verrazano.



Titola paĝo kaj interna paĝo de la 3-a volumo de Ramusio.

© Publika bieno

Ramusio, Giovanni Battista. *Terzo volume delle navigationi et viaggi raccolto gia de M. Gio. Battista Ramusio...* . Vol. 3. Venice: Nella stamperis de Giunti, 1565.

Fonto: National Library of Canada

Giovanni Battista Ramusio estis venecia ŝtatisto kaj sekretario de la Konsilio de la Dek. Li dediĉis sian vivon al la temo de la malkovro de nekonataj landoj.

Li eldonis la priskribon de esploraj vojaĝoj, entute pli ol kvindek) en tri volumoj kun la titolo "Delle Navigazioni et Viaggi".

Original quotation, in Ramusio:

[french translation]

"Poscia ci mostrarono con segni, che passate dette tre cadute, si po teua navigar per detto signes, par le trois hommes du pays fiume il spatio di tre lune: & che lungo di qui nous avaient conduits, qu'il y avait dette montagne che sono verso tramontana trois autres sauts d'eau sur ledit fleuve, v'è un fiume grande, il quale descende da comme celui où étaient nos barques; ponente come il detto fiume: Noi pensammo mais nous ne pûmes comprendre che quello sia il fiume che passa p il reame di quelle distance il y avait entre l'un et Saguenay. & senza che li faces simo dimanda l'autre, par faute de langue. Puis ils o segno alcuno presero la catena del nous montraient par signes que, passé subbiotto del Capitano che era d'argen to, & lesdits sauts, l'on pouvait naviguer li manico del pugnale di uno de nostri plus de trois lunes sur le fleuve. [...] et compagni marinari, qual era d'ottone giallo sans que nous leur fissions aucune quanto l'oro, & il pendeua dal fianco, & ci demande ni signe, ils prirent la chaîne mostraron che quello veniua di sopra di detto du sifflet du capitaine, qui est fiume, & che vi sono di AGOVIONDA che d'argent, et un manche de poignard, vuol dire maluage genti, iquali vanno armati qui était de laiton jaune comme de fino in cima delle dita, mostrandocianche la l'or, lequel pendait au côté de l'un de forma dell'arme loro, lequali sono fatte di nos compagnons mariniers, et

corde & legno lavorate & tissute insierne, montrèrent que cela venait de l'amont dandoci ad intendere che detti agouionda di dudit fleuve, [...] Le capitaine leur continuo fanno guerra tra loro. ma per difetto montra du cuivre rouge, qu'ils di lingua non petemmo intender da loro appellant caignetdazé, indiquant vers quanto spatio v'era sino un detto paese. Il ledit lieu et demandant par signes s'il Capitan mostro loro del rame rosso, qual venait de là. Et ils commencèrent à chiamano CAIGNETADZE dimostrandoli secouer la tête, disant que non, en con segni voltandosi verso detto paese li montrant qu'il venait du Saguenay, qui dimandaua se veniua da quelle parti, & eglino est à l'opposé du précédent." cominciarono a crollar il capo volendo dir no, (Cartier 1992, 205-206) maben ne significarono che veniua da Saguenay, qual è dalla banda contraria del precedente, & [...]" (Ramusio 1565, 448)

La priskribo de la dua vojaĝo estis eldonita en la franca en 1545, sed sen nomo de aŭtoro. La manuskripto, kiu utilis por tiu eldono, neniam estis retrovita. Tri manuskriptoj, kiuj priskribas tiun duan vojaĝon ekzistas en la nacia Biblioteko (no 5 589 eldonita de Lescarbot, no 5 644 difektita, no 5 653, eldonita en Kebeko en 1843). Robert Le Blant asertas, ke temas nur pri kopioj de perdita originalo. Verŝajne Jehan Pouillet estis la aŭtoro de tiu priskribo (sen certeco).

Pri la priskribo de la tria vojaĝo estas nur nekompleta anglalingva versio farita de Hakluyt en 1600, laŭ malaperinta dokumento, kiun li estis trovinta en Parizo proksimume en 1583.

Oni povas konsideri, ke Jacques Cartier malkovris Kanadon, kvankam li ne komplete esploris la landon, kiun oni nomas hodiaŭ Kanado.

Jacques Cartier estas inter la gravaj homoj de la 16-a jarcento. Li estis la unua, kiu registris la bordojn de la golfo Sankta-Laŭrenco kaj li priskribis la vivon de la indianoj de la nor-orienta parto de norda Ameriko.

En 1535, li malkovris la riveregon Sankta-Laŭrenco, unu el la plej gravaj riveregoj en la mondo, kiu fariĝis la ĉefa vojo por la kreado de la franca imperio en Ameriko, por la malkovro de la aliaj partoj de norda Ameriko: la Hudsona golfo, la okcidenta maro kaj la riverego Misisipio.

Oni povas riproĉi al li, ke li fiaskigis la koloniadon de Kanado en 1542, ĉar nur li havis la necesajn konojn pri la regiono, kiam li forlasis Roberval en Saint-Jean de Novtero.

Pro tiu malsukceso, necesos atendi dum pli ol duonjarcento por la organizo de novaj projektoj pri koloniado de Novfrancio.

4 Portretoj de Jacques Cartier

Neniu portreto estis farita de Jacques Cartier dum lia vivo. Eble ĉar oni riproĉis al li la malsukceson de la unua franca kolonio en Kanado.



Jacques Cartier laŭ Henri Beau

Fonto: Library and Archives
Canada, Acc. No. 1970-188-27
W.H. Coverdale Collection of
Canadiana



Portreto de Jacques Cartier fare de Théophile
Hamel (1817-1870)

© Civilization.ca



Jacques Cartier

© Publika bieno

Credit: National Archives of
Canada/C-007298

Fonto: National Archives of Canada




Portreto de Jacques Cartier fare de Auguste
Lemoine

5 Datoj pri Jacques Cartier kaj ties vivo

- 1488: Malvenko de la bretonoj de la duko Francisko la Dua kontraŭ la armeo de la franca reĝo Karolo la Oka, estrata de La Trémoille.
- 1491: naskiĝo de Jacques Cartier en Saint-Malo (Bretonio, Francio) inter la 7-a de Junio kaj la 23-a de Decembro. Edziniĝo de la dukino Anna de Bretonio al la franca reĝo Henriko la Oka.
- 1492: Kristoforo Kolumbo malkovris Amerikon, serĉante vojon al Hindio, irante okcidenten.
- 1497: Jean Cabot, venicia navigisto esploris la maron de Labradoro por Anglio.
- 1506-1508: Jean Denys kaj Thomas Aubert esploris la enfluejon de la riverego Sankta-Laŭrenco.
- 1514: Morto de Anna de Bretonio, dukino de Bretonio kaj reĝino de Francio.
- 1515: Francisko la Unua fariĝis reĝo de Francio.
- 1520: Jacques Cartier edziniĝis al Catherine Des Granches.
- 1524: Jean Verrazzano, florenca navigisto esploris, por la franca reĝo Francisko la Unua, la bordojn inter Florido kaj Novtero, kiun li nomis Novfrancio.
- 1532: Definitiva kuniĝo de Bretonio al Francio.
- 1534: Unua vojaĝo de Jacques Cartier al Kanado.
- 1535-1536: Dua ekspedicio de Jacques Cartier al Kanado ĝis Hochelaga.
- 1539: Baptado de 3 amerindianoj en Saint-Malo.
- 1541-1542: Tria vojaĝo de Jacques Cartier al Kanado. Li instalas kaj regis la kolonion de Charlesbourg-Royal (Cap-Rouge) antaŭ ol reveni al Saint-Malo.
- 1542: Deiro de Roberval de La Rochelle kaj renkontiĝo kun Cartier en la haveno Sankta-Johano de Novtero.
- 1543: Reveno de Roberval kun la postvivintoj de la kolonio de Charlesbourg-Royal
- 1545: Jacques Cartier ĉesigis vojaĝi kaj ekrestadis en Saint-Malo.
- 1556: Eldono de la 3-a volumo de "Delle Navigationi et Viaggi" de Giovanni Battista Ramusio en Venecio (Italio), kiu entenas la priskribon de la du unuaj vojaĝoj de Jacques Cartier.
- 1557: La pesto trafis Saint-Malo. Jacques Cartier mortis en la 1-a de Septembro pro la pesto.
- 1580: Esplorado de la insulo Mont Royal fare de J. Noël (nevo?, filo de nevo? de Jacques Cartier) de Saint-Malo.

6 Diversaj mapoj



Mapo de diversaj ekspedicioj okcidenten por malkovri vojon al Azio



Harlea mapo – 1536

Parto de mondomapo, dirata de Harley

Pierre Descelliers (lernejo de Dieppe).

Verŝajne tuj post la alveno de Jacques Cartier al Hochelaga en 1535. Facile legebla estas la vortoj "Canada" kaj "Ochilaga" (por Hochelaga).

Fonto: British Museum, Londres



Mapo Pierre Descelliers – 1546

Parto de pli granda mapo de Pierre Descelliers.

Desegnita post la provo de koloniado en Charlesbourg-Royal fare de Cartier kaj Roberval. Mendita de la reĝo Henriko la Dua.

Fonto: Bibliothèque Nationale, Paris.

Originalo en la biblioteko de la universitato John Rylands en Manchester, Britio.



Unu el la 15 mapoj el la atlaso de Vallard - 1547

Ĉiu (57cm x 39.2cm) mapo montras la kolonion de Charlesbourg-Royal instalitan de Cartier kaj Roberval en 1541 kaj 1542. Centre videblas fortikigita enklavo reprezentanta la fuorton de Charlesbourg-Royal renomita France-Roy fare de Roberval. Videblas ankaŭ amerindianoj armitaj per arkoj kaj sagoj.

Fonto: Huntington Library - San Marino, Kalifornio.



Mapo de Pierre Desceliers - 1550

Tiu mapo montras la malkovrojn de Jacques Cartier kaj de Roberval post la malsukceso de la kolonio de Charlesbourg-Royal. Sur tiu mapo videblas la plej fora punkto, kiun ili atingis en la esplorado de la Okcidentaj Hindioj.

Mondomapo de Pierre Desceliers, 1550, British Museum, Londono, Britio.



Mapo de la golfo Sankta-Laŭrenco



Mapo de la golfo Sankta-Laŭrenco



Mapo de la golfo Sankta-Laŭrenco

7 Referencoj

- TRUDEL Marcel - Histoire de la Nouvelle France - Les vaines tentatives 1524-1603 Montréal, Fides, 1966. Profesoro kaj direktoro, Institute of Canadian Studies, Carleton University, Ottawa. Vic-direktoro por la unua volumo de Dictionnaire biographique du Canada/Dictionary of Canadian Biography.
- La muzeo de Jacques Cartier en la restaŭrita nobeldomo de Limoëlou, kiu apartenis al la esploristo (en Rothéneuf apud Saint-Malo, Bretonio, Francio): <http://www.musee-jacques-cartier.com/>
- Malnovaj mapoj: <http://jacquescartier.org/compagnons/index-occidentales.html>
- Priskribo de la vojaĝoj de Cartier: http://www.civilization.ca/vmnf/explor/cartier_e4.html
- <http://www.republiquelibre.org/cousture/CARTIER.HTM>

Tabelo de la enhavo

Jacques Cartier, franca navigisto (1491-1557)	1
1 Resumo	1
2 Enkonduko	1
3 La vivo de Jacques Cartier	1
3.1 La unua vojaĝo (20-a Aprilo – 5-a Septembro 1534)	2
3.2 La dua vojaĝo (19-a Majo 1535 – Julio 1536)	5
3.3 La tria vojaĝo (23-a Majo 1541 – Septembro 1542)	11
4 Portretoj de Jacques Cartier	18
5 Datoj pri Jacques Cartier kaj ties vivo	19
6 Diversaj mapoj	20
7 Referencoj	24